# LA FAMILIO



Ĝi estas domo.

Kiuj loĝas en la domo? En la domo loĝas familio. En la familio estas patro, li estas Petro. Li laboras en fabriko. Li havas edzinon, ŝi estas Liza. Ŝi instruas, ŝi estas instruistino. Ŝi laboras en la lernejo. Liza kaj Petro havas filon kaj filinon. La filo estas Karlo, li studas en la lernejo. La filino estas Anna, ŝi ne studas, ŝi estas malgranda. Ŝi estas la fratino de Karlo.

***KIU ESTAS KIU?***

*Petro estas la ………… de Liza.*


*Petro estas la ………… de Anna.*

*Liza estas la ………….. de Karlo.*

*Karlo estas la ………… de Liza.*

*Karlo estas la ………… de Anna.*

*Anna estas la ………… de Petro.*




La patro de Petro estas Adamo. Li estas la avo de Anna kaj Karlo. Anna estas la nepino de Adamo. La frato de Liza estas Jozefo. Li estas la bofrato de Petro.

***KIU ESTAS KIU?***

*La patrino de Liza estas la ………… de Anna.*

*La patro de Liza estas la ………… de Karlo.*

*La fratino de Petro estas la ………… de Liza.*

*Karlo estas la ………… de Adamo.*

